Erich Mühsam,

Rezignado

tradukita de Cezar

Gustis mi dumvive ĉion
de la am', batal' kaj vin'.
Mia rusthakil' nenion
ja plu trafus je la fin'.

Kaj surteras disbatita
trinkpokalo jen sen fam'.
Mia kara gestas spite:
"Ho, amik', glor' pasis jam."

Finsimboloj, mi tre dankas,
naskhelpantoj de l' poem'.
Suicidvol' tamen mankas,
Al pistol' ne estas em'!

Traduko de la Germana poemo "Resignation" de Erich Mühsam *(∗1878-04-06 – †1934-07-10) en Esperanton de* Cezar *(civila nomo: Hans-Georg Kaiser, ∗1954-05-21).*

Arg-1114-2250 (2015-01-11 22:43:17)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun poemon en `http://cezartradukoj.blogspot.de/`*.*